

## Unu jarcento de esperanto-instruado: I

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 aŭgusto 13

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND pri la temo unu jarcento de esperanto-instruado.

En ĉiu retrospektiva analizo de fenomeno oni emas proponi karakterizajn periodojn. Koncerne la instruadon de esperanto, ju pli mi enprofundiĝas en la demandon, des pli mi konvinkiĝas, ke ĉio disvolviĝas tre malrapide, kaj ke ni daŭre troviĝas en la enkonduka kaj pionira fazo. Estas antaŭvideble, ke foje esperanto estos lerneja fako en egaleco kun aliaj. Sed nun la esperanto-instruado okazas plej ofte ekster la lernejoj. La Lingvon Internacian de d-ro Esperanto oni ĝenerale lernas mem aŭ en klubaj rondoj okaze de vesperaj aŭ semajnfinaj kursoj; fakte nur parteto el la esperantoparolantoj intimiĝis kun la lingvo pro lerneja eblo. Tial la aĉeteblaj lerniloj ĉefe celas eksterlernejajn mediojn.

A.- Ne ekzistas seriozaj statistikoj pri la maniero lerni esperanton, sed la sondadoj ĉe Kultura Centro Esperantista montras, ke tre verŝajne nuntempe maksimume 2 procentoj el la esperantistoj ŝuldas sian konon de esperanto al lerneja instruado. Proksimume 4 aŭ 5 procentoj intimiĝis kun la lingvo en la familia medio. La aliaj esperantistoj ĉu memlernis la lingvon: 40 procentoj proksimume, ĉu frekventis pli malpli regule kaj entuziasme klubajn kursojn ĝenerale vesperajn aŭ semajnfinajn: 50 procentoj.

Cl.- La esperanto-lernolibroj havas grandajn komunajn similecojn kaj mankojn. Ili ne celas la ellernon de la lingvo kaj ekzercigas la samajn listojn de prefiksoj kaj sufiksoj sen antaŭesploro, ĉu aliaj afiksoj devus esti ankaŭ menciitaj. Por la daŭriga instruado la libro **Paŝoj al plena posedo** de William AULD ne havas konkurantojn. Mankas enkondukaj verkoj al la studo de la historio kaj literaturo de esperanto.

A.- Kritika trastudo de la aperintaj lernolibroj montras, ke ili ĉefe apartenas al la pertraduka instruado. Ili proponas vortojn, tekstojn, gramatikajn ekzercojn kaj respondotajn demandarojn. Ili bedaŭrinde ne proponas strukturŝanĝajn ekzercojn, kiuj helpus la studentojn pli rapide akiri la parolkapablon kaj emancipiĝi el la strukturoj de la gepatra lingvo.

Cl.- La vortfarada teorio de René DE SAUSSURE historie ludis decidigan rolon. Antaŭ la lanĉo de lia konkurso pri la signifo de la vorto GRANDO, en la lernolibroj la vortfaradaj klarigoj estis tre nebulaj kaj diverĝaj. La danĝero de la Ido-skismo instigis la esperantistojn ekobservi sian lingvon kaj la priskribo de René DE SAUSSURE renkontis unuaniman akceptemon. Zamenhof mem bonvenigis ĝin, la Akademio de Esperanto oficialigis ĝin kaj la kursverkantoj trovis en ĝi la necesan komplementon al la **Fundamento de Esperanto**, kiu estis tro minimuma bazo kun kelkaj kontraŭdiroj.

A.- Do se oni volas nepre decidi pri periodoj en la disvolviĝo de la esperanto-instruado, oni parolu pri la antaŭ-desaŭsura periodo, ĉar la lerniloj eldonitaj antaŭ la publikigo de **La Vortteorio en Esperanto** ne longe postvivis la jaron 1910. Inter ili ni menciuj la lernolibrojn de Louis DE BEAUFONT kaj iliajn tradukojn. Ili devis esti repensitaj. La efemera sed efika aktiveco de Instituto de Esperanto fondita en 1908 kun la celo okazigi ekzamenojn kadre de kongresoj, kun siaj sidejoj en Ĝenevo, Parizo kaj Nov-Jorko, dankal la dinamismo kaj efika

laboro de Edmond Privat kaj de liaj helpantoj en Svislando, Francio kaj Usono, multe kontribuis al la rapida diskonigo de la desauŝura vortteorio. Ankaŭ multe helpis tiun diskonigon la fakto, ke Hector HODLER kapablis kunlaborigi la esperantistaron kadre de la promesplena Universala Esperanto-Asocio, kies sidejo estis Ĝenevo, la urbo de René DE SAUSSURE, kaj ke Ferdinand DE SAUSSURE, la patro de la moderna lingvistiko, estas fakte la frato de René DE SAUSSURE. Tiu parenceco efikis pozitive.

Cl.- La unua mondmilito plifortikigis la influon de Ĝenevo. La naskiĝo de Ligo de Nacioj turnis ĉies rigardojn al la urbo pedagogie renoma pro la avangardismo de Instituto Jean-Jacques Rousseau, kaj ĝuste Pierre BOVET, la direktoro de tiu fakto de la ĝeneva universitato, invitis kaj prezidis la Konferencon pri Esperanto en Lernejoj. La unua okazis en pasko 1922 en Ĝenevo mem kunvenigante plurajn centojn da instruistoj el 28 landoj kaj 16 reprezentantojn de registaroj. Estis antaŭvidite, ke tiu konferenco kunvenos ĉiujn 5 jarojn. Bedaŭrinde nur la 2-a povis disvolviĝi en pasko 1927 en Praha. Ĝia temo estis **Paco per Lernejo**. La renaskiĝo de la naciismoj, kiu fine kondukis al nova mondmilito, krizigis la esperanto-movadon ekde la jaroj tridekaj, kaj en 1932 la etoso jam ne plu favoris la kunvokon de la konferenco. Iompostiom Ĝenevo ĉesis ludi ĉefrolon. Internacia Esperanto-Ligo konkurencis UEA-n kaj rigardigis al Britio.

A.- Laŭ sciencaj kriterioj Pierre BOVET daŭrigis la enketon pri la instruado de esperanto en la lernejoj, kiun li komencis en 1920. Lin tre efike helpis Henriette ITH; sed fakte nur post la dua mondmilito, tio estas en 1948, ili fine publikigis raporton pri tiu enketo dankal la eldona helpo de Sveda Esperanto-Federacio. Ne plaĉis al IALA (International Auxiliary Language Association), kiu aŭspiciis la enketon, ke tiu ĉi pruvis, ke inter ĉiuj planlingvaj projektoj nur esperanto estis fakte instruata en lernejoj kaj privataj kursoj. Mankis al Pierre BOVET la rimedoj por pli rapida laboro, ĉar IALA ĉesis subvencii lin. La ĉefaj esperanto-organizaĵoj ne kunlaboris por anstataŭi IALA-n. Fakte en la tuta historio de la esperanto-instruado ni neniam konstatas veran kunlaborem de la ĉefaj esperanto-organizaĵoj favore al objektiva enketado pri esperanto. Estas pro tio, ke daŭre mankas al ni statistikaj konfirmoj pri la disvolviĝo mem de esperanto. Tiurilate la enketo de Pierre BOVET estas unikaĵo. Ĝi okazis, ĉar verŝajne ĝi estis entreprenita de neesperantista organizaĵo.

Cl.- Edmond PRIVAT retiriĝis en la itallingvan kantonon Tiĉino post kiam en 1930 li estis fondinta kun Andreo CSEH Internacian Esperanto-Instituton, kiu rigardigis al Hago. Ekde tiam Nederlando ekludis kreskantan rolon, unue pedagogie, kaj post la dua mondmilito ĉefe organize.

A.- Fakte la Cseh-Metodo ekludis ĉefrolon en la esperanto-instruado ekde la jaroj tridekaj. La Cseh-Instituto, tiel oni eknomis Internacian Esperanto-Instituton, kapablis ne nur lanĉi tre efikan instru-teknikon, kiu evitis la tempoperdan tradukan instruadon. Tiu metodo estis ĉefe paroliga, dum la tradiciaj lerniloj ĝenerale orientas la studantojn al la skriba uzo de la lingvo.

Cl.- La venontan semajnon ni raportos pri la influo de la Cseh-Metodo kaj pri aliaj manieroj koncepti la esperanto-instruadon. Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!